# MIRTELOJ

Mi iris hodiaŭ kolekti mirtelojn.
Avino dumvoje rakontis fabelojn
pri Ruĝa Kufeto kaj lupo sovaĝa,
pri nanoj, feinoj, ŝuisto kuraĝa,
malriĉa paŝtisto kaj fluto sorĉita,
pri kuka kabano bongusta kaj pita,
pri drako terura kaj knabo aŭdaca.
Pro tio tuttute ne estis mi laca
kaj hejmen alportis en buntaj siteloj
multege da frandaj, maturaj mirteloj.



La poemo aperis en Fabela Mondo, Volumo 1.
Ni publikigas ĝin kun la permeso de Esperantina Mirska, filino de la aŭtorino